

# LA SUNO HISPANA

## Al niaj legantoj

Okaze je la tricentjara datreveno de la apero de «La Sprita junkro Don Kihoto de Manĉujo», nia patrujo estas donanta pruvon pri la altestimo, kiun ĝi difinas al siaj filoj eminentaj kaj ofermontron de admirado kaj respekto al la nemortema verko de la princo de ĉefgeniuloj.

Ne estas hispana loko, sin detenanta de la entuziasmo elveckita de tiel nobla entrepreno: ĉie oni solenigas kaj festas la bonfaman okazintaĵon: pruvo evidenta pri ĝia granda signifo por nia nacia gloro kaj literatura mirheleco.

LA SUNO HISPANA elkore altiĝas al la patruja festado kaj oferdonas sian modestan kunhelpon, dediĉante ĉi tiun numeron al la memoro de la glora verkisto, kies genia verko apartenas al la tuta mondo kaj tial prezentas karakteron de nediskutebla internacieco.

En tiujn ĉi paĝojn nur oni enmetis fragmentojn de *Cervantes'aj verkoj*, tradukitaj de hispanaj esperantistoj, al kiuj ni el tuta koro dankas la intereson, kiun ili elmontris helpante al ni en tiel malfacilega tasko.

Dio volu, ke tiu ĉi numero estu antaŭiranto de samspecaj laboroj, kaj ke ni vidu baldaŭ publikigitan Esperante la nemorteman poemon, kiu estas ĉiulingve tradukita kaj prezentus sendube novan brilegan elvidiĝon, reornamita per la beligajoj, kiujn prezentas la ĉarmega, riĉa kaj multesprima kreaĵo de la doktoro rusa!

LA REDAKCIO.

## A nuestros lectores

Con motivo del tercer centenario de la publicación de «El Ingenioso Hidalgo Don Quijote de la Mancha», nuestra patria está dando una prueba de la alta estimación que profesa á sus hijos insignes y un homenaje de admiración y respeto á la obra inmortal del príncipe de los ingenios.

No hay lugar de España que se haya sustraído al entusiasmo despertado por tan noble empresa: en todas partes se solemniza y festeja el fausto acontecimiento; prueba evidente de su gran significación para nuestra gloria nacional y esplendor literario.

LA SUNO HISPANA se adhiere cordialmente á la fiesta patria y ofrece su modesto concurso, dedicando este número á la memoria del eminente escritor cuya obra genial pertenece al mundo entero y presenta, por tanto, carácter de internacionalidad innegable.

En estas páginas se incluyen solamente fragmentos de *Obras de Cervantes*, traducidos por esperantistas españoles, á quienes agradecemos de todo corazón el interés que han demostrado al ayudarnos en tan árdua tarea.

¡Ojalá sea este número precursor de otros trabajos de la misma índole, y veamos pronto publicado en Esperanto el poema inmortal, que ha sido traducido á todos los idiomas y que seguramente ofrecería un nuevo deslumbrador aspecto, revestido de las galas que ostenta la bellísima, rica y variada creación del doctor ruso!

LA REDACCIÓN.

## El la Antaŭparolo de «Novelas Ejemplares»

### Portreto de Cervantes (pentrita de li mem)

Tiu kiun vi vidas tie ĉi, de agla vizaĝo, kaŝtankolora hararo, frunto glata kaj ebena, kun gajaj okuloj kaj nazo kurba, kvankam bonforma, arĝenta barbo kiu antaŭ dudek jaroj estis ora; lipharoj longaj, buŝo malgranda, liaj dentoj nek multaj nek longaj, ĉar li havas nur ses, kiuj estas en malbona stato kaj en pli malbona ordo, ĉar ili havas nenian kontakton reciprokan; la korpo inter du ekstretoj, nek granda nek malgranda; lia vizaĝkoloro hela, pli blanka ol bruna, la dorso iom kurbigita kaj la piedoj ne tre facilmovaj; tiu-ĉi, mi diras, estas la vizaĝo de l' aŭtoro de *La Galatea*, de *Don Kihoto de la Manĉo*, kaj de tiu kiu faris la *Viaĝe del Parnaso* imitante tiun de César Caporal Perusino, kaj de aliaj verkoj kiuj troviĝas ie nezorgataj, kaj eble sen la nombro de ilia posedanto; li estis multajn jarojn soldato, kaj dum kvin kaj duono malliberulo, kiam li lernis havi paciencon en kontraŭeco; li perdis sian maldekstran manon per pafo de arkabuzo en la mara batalo de Lepanto, kaj tiu vundo, kvankam ĝi ŝajnas malbela, estas por li bela, ĉar li ricevis ĝin en la plej memorinda kaj honora okazo kiun vidis pasintaj centjaroj aŭ esperas vidi la venontaj, militante sub la venkaj standardoj de l' filo de tiu milita fulmo, Karolo V, feliĉe memorinda.

*Tradukis N. M.*

---

## EL Don Kihoto de la Manĉo

### SinJORINO Oriana al Dulcineo de Toboso

Ho, se mi havus, bela Dulcineo,  
 Por ĝu' pli oportuna kaj ripoza,  
 Miraflores lokitan en Toboso,  
 Kaj anstataŭ London' vian vilaĝon!  
 Ho, se mi estus korpo kaj animo  
 De la viaj belvesto kaj deziro,  
 Kaj alestus al ia mirbatalo  
 De l' fama kavaliro, de vi ravita!

Ho, se mi tiel ĉaste min eltirus  
 El sinjor' Amadis', kiel vi faris  
 Pri la modera junkro Don Kihoto!  
 Mi, sen envi', ja estus enviata,  
 Kaj estus gaja la malĝoja tempo,  
 Kaj ĝuus la plezurojn sufiĉege.

*Tradukis V. INGLADA.*

*Dedicita al mia kara amiko S-ro Jimenez Loira.*

## UNUA PARTO

## EL ĈAPITRO II

... Trairante do nia tre fiera aventurulo, paroladis kun si men kaj diris: «Kiu dubas pri tio, kion skribos la scienculo, kiu en la venonta tempo verkos la veran historion de miaj famaj heroaĵoj, kiam li rakontos tiun ĉi frumatenan eliron de mi efektivigitan, ĉu vere, li ne diros la jenon?» Ĵus estis la flavruĝa Apolo disseminta sur la supraĵo de la larĝa kaj ampleksa tero la orajn fadenojn de sia bela hararo kaj la malgrandaj kaj multekoloraj birdetoj per iliaj harpaj langoj ĵus salutis dolĉe kaj plenharmone la alvenon de la rozkolora Aŭroro (kiu, forlasinte la molan liton de ĝia ĵaluzema edzo, sin montradis al la mortemuloj tra la pordoj kaj balkonoj de la manĉa' horizonto) kiam la fama kavaliro Don Kihoto de la Manĉo forlasis la senagemajn plumojn de sia lito kaj, rajdinte sur lia famega ĉevalo Rocinanto, ekiris tra la antikva kaj de ĉiuj konata Montiel'a kampo. «Estas vere ke li tie trairadis. Tuj li aldonis: «Feliĉa sendube aĝo kaj feliĉa tiu jarcento, en kies daŭrado estos alirontaj al la lumo miaj heroaĵoj, tre indaj esti sur bronzo gravuritaj, skulptitaj sur marmoro kaj sur tolo pentritaj por rememorigo en la estonteco! Ho! saĝa sorĉisto, kiu ajn vi estos, kaj kiun la sorto difinos por esti la rakontisto de tiu-ĉi stranga historio, rememorigu, mi petas, mian bonan Rocinanton, kiu estas mia ĉiama kunulo dum ĉiuj miaj travojroj kaj kuradoj» Poste li ekdiris, kiel se li estus vere enamiĝito: «ho! mia princino Dulcinea, mastrino de tiu-ĉi mallibera koro! vi faris al mi grandan ofendon disĵetinte min kaj riproĉinte per severa ordono, kiu malpermesas min stariĝi antaŭ via bela moŝto. Memoru, mi petas vin, pri tiu-ĉi mallibera koro, kiu tiel multe suferas pro amo al vi.»

Al tiuj ĉi li alkudradis alian serion da malŝpritaĵoj, ĉiuj similaj al tiuj, kiujn li tralegis en siaj libroj, penante imiti kiel eble iliajn dirmanierojn. Pro ĉio tio ĉi li vojiradis tiel malrapide kaj la suno sin levis tiel rapide kaj tiele bruligis, ke estus sufiĉe por fluidigi lian ĉerbon, se li havis ian.

*Esperantigis* JUAN G. MARTIN—E. 10.614.

## EL ĈAPITRO IX

**Kie finiĝas la mirindega batalo kiun havis la belkreska vasko kaj la kuraĝa Manĉo.**

Ni lasis en la antaŭa ĉapitro la kuraĝan vaskon kaj la faman D. Kihoton, kiam ili levis la nudajn glavojn, pretajn doni du furiozajn tranĉfrapojn, tiaj ke se ili celus en trafon, ili ambaŭ sendube sin dividus kaj trafendus de supre ĝis malsupre kaj diskreviĝus kiel granato, kaj en tiel duba momento, haltiĝis, kaj interrompiĝis tiel agrabla historio, kaj ĝia aŭtoro ne sciigas nin kie povos troviĝi tio, kio pri ĝi mankis al ni.

Tio ĉi alportis al mi grandan ĉagrenon, tial ke la plezuro esti leginda iomete, aliformiĝis je malplezuro, kiam mi pensis pri la malbona vojo kiu prezentigis por eltrovi tiom multe, kiom laŭ mia opinio, mankis el tiel agrabla rakonto.

Ŝajnis al mi neeble kaj ekster ĉia bona kutimo ke tiel bona kavaliro ne havis ian scienculon, prenanta sur sin la aferon skribi liajn neviditajn faraĵojn, kiel havis ĉiuj vagiraj kavaliroj, pri kiuj diras la popoloj, ke ili serĉas okazintaĵojn; ĉar ĉiu el ili havis unu aŭ du scienculojn, kiel nur por tio faritaj, kiuj ne nur skribis iliajn fara-



dojn, sed ankaŭ detale priskribis iliajn plej malgrandaj pensojn kaj infanaĵojn, kaj tiu tiel bona kavaliro ne devus esti tiel malfeliĉa por ne havis tion, kion troe havis Platir'o kaj aliaj similaj. Kaj tiel mi ne povis ekkredi, ke tiel ĉarma historio restis neplena kaj kripla, kaj mi kulpigis la malbonecon de la tempon, ĉion ŝiranta kaj konsumanta, kiu ĝin havas aŭ kaŝitan aŭ detruitan.

Aliparte ŝajnis al mi, ke, ĉar ĉe lia libraro oni trovis librojn tiel modernaj kiel *Desengaños de celos* kaj *Ninfas y pastores de Henares*, ankaŭ lia historio devis esti moderna, kaj, kvankam ĝi ne estus skribita, estus almenaŭ en la memorado de la popolo de lia vilaĝo, aŭ en tiu de ĝiaj ĉirkaŭaj.

Tia pensado lasis min konfuza kaj dezirema scii reale kaj vere la tutan vivadon, kaj miraklojn de nia fama hispano, Don Kihoto de Manĉujo lumo kaj spegulo de la manĉa kavalararo kaj la unua kiu en nia epoko kaj en tiuj ĉi malfeliĉaj tempoj ŝarĝis sur sin la ĝenon kaj la ekzercon de vagiraj armiloj kaj tiun malfari ofendojn, helpi vidvinojn, defendi virgulinon, el tiuj kiuj trairadis kun siaj skurĝoj kaj ĉevaloj kunportante sur siaj ŝultroj tutan sian virgecon de monto al monton, de valo al valon; tiel ke, se ia ajn petolulo aŭ malnoblulo el tiuj kiuj portas hakilon kaj popolan ĉápon, aŭ ia supermezura giganto ne malvirgigus ilin, ia virgulino estis en la pasintaj tempoj, kiu en la fino de la okdek jaroj, dum kiuj ŝi ne dormis sub tegmento ŝi iris en sian tombon tiel netuŝita kiel ŝia patrino ŝin naskis.

Mi diras do, ke pro tiuj ĉi kaj aliaj multaj respektoj, nia belkreska Don Kihoto estas inda je senĉesaj kaj memorindaj laŭdoj; kaj ankaŭ al mi oni ne devas rifuzi ilin, pro la klopodoj kaj akurateco, kiujn mi alportis por serĉi la finon de tiu ĉi agrabla historio. Kvankam mi bone scias ke se la ĉielo, la hazardo kaj la sukceso ne helpos min, la mondo restos mankohava kaj sen la amuzaĵo kaj plezuro, kiun dum preskaŭ du horoj povos ĝui tiu, kiu atente legos. La eltrovo okazis, do, en la jena maniero.

Esperantigis: A. GUINART, *Sk.*

## EL ĈAPITRO XI

Tuj kiam Don Kihoto bone trankviligis sian stomakon, li prenis manplenen da glanoj, kaj rigardante ilin atente, komencis diri la jenajn rezonojn: Feliĉa epoko kaj centjaroj feliĉaj, tiuj, kiujn nomis oraj la antikvuloj, kaj ne ĉar la oron, tiel multe ŝatatan en la fera nuntempo, oni ricevis sen ia peno en tiu rava tempo. sed nur ĉar la tiamaj kunvivantoj ignoris la du vortojn «via» kaj «mia». En tiu sankta epoko ĉiuj aferoj estis komunaj: al ĉiu estis necese por ricevi la ĉiutagan nutraĵon, nur peni la manon levi kaj ĝin depreni de la fortikaj glanarboj, kiuj propramove estis ilin invitantaj per sia dolĉa kaj ĝustematura frukto. La klaraj fontoj kaj fluantaj riveroj per belega sufiĉego oferdonis al ili bongustan kaj diafanan akvon. En la enfendoj de ŝtonegoj kaj kavaĵoj de la arboj sin kolektis la diligentaj kaj diskretaj abeloj donacante al ies mano, sen ia profitamo, la fruktodonan eltiron el sia dolĉega ellaboraĵo. La kuraĝaj korkaj glanarboj el si delasis sen alia artifiko ol tiu de sia ĝentileco, siajn larĝajn kaj malmultepezajn krustaĵojn, per kiuj oni komencis tegmente kovri la domojn sur krudaj stangoj konstruitajn, kaj nur starigitajn por sindefendo kontraŭ la vetera ŝanĝiĝemo. Ĉio estis tiam paco, ĉio—amikeco, ĉio,—interkonsento: ankoraŭ la multepeza enfosilo de la kurba plugilo ne estis kuraĝinta malfermi nek viziti la pian internajon de nia unua patrino, kiu sen ia perforto,

oferdonis el ĉiuj partoj de sia fruktoporta kaj vasta interno, kion povis satigi, nutri kaj amuzi la gefilojn, kiuj tiam ĝin posedis. Ho! Nur tiam vagiris la simplanimaj kaj belaj kampoknabinoj de valo al valo kaj de teraltaĵo al teraltaĵo, kun la haroj kunplekte ornamitaj aŭ simple disfalintaj sur la ŝultroj, sen aliaj vestoj, ol tiuj, kiuj necesaj estas por honeste kovri, kion honesteco volas kaj ĉiam volis, ke oni kovru: kaj ne estis ŝiaj ornamaĵoj, tiuj nun uzataj, kiujn plikarigas la Tira purpuro kaj la tlel multmaniere elturmentita silko, sed nur faritaj el kelkaj lampacfolioj (1) interplektitaj kun hederaĵoj, per kio la knabinoj aperis tiel beleksteraj kaj zorgornamitaj, kiel niaj nunaj korteganinoj per la strangaj kaj specialaj ornamelpensoj, kiujn al ili montris ŝia senokupa scivolemo. Tiam oni beligis la animajn ampensojn simple kaj senartifike en sama formo kaj maniero kiel ili estis ekkomprenitaj, ne serĉante pliornaman vortturnon por ilin pliŝatigi. Ne estis la trompado, malvereco en agoj, kaj malico intermiksita kun la vero kaj animsimpleco. La justeco staris ĉe sia difinita ejo, kaj ĝin ne kuraĝis malkvietigi nek ofendi la partiemoj kaj profitamo, kiuj nun tiom multe ĝin difektas, konfuzas kaj persekutas. La arbitran leĝon ankoraŭ ne konis la intelekto de juĝisto, ĉar tiam nenio kaj neniu estis juĝotaj. La knabinoj kaj honesteco iradis, kiel mi jam diris, solaj kaj senakompanaj, sen timo esti ofendataj de malpropra senhonteco kaj volupta deziro, kaj ŝia malvirtperero naskiĝis nur el ŝia volonto kaj propra volo. Kaj nun en nia abomena tempo nenia knabino estas sen danĝero, eĉ ŝirmata kaj fermata en alia nova labirinto, kiel la Kreta: ĉar tie tra la enfendetoj aŭ kun la aero mem per la fervoro de la malbenita delogpetado eniras en ilin la ampesto, kiu renversas ilian virtrifuĝejon. Kaj en la celo atenti la montritan sendanĝerecon, poste, kiam estis pasinta multa tempo kaj plikrŝkinta la malico, oni starigis la ordenon de vagaj kavaliroj por protekti fraŭlinojn, defendi vidvinojn kaj helpi al georfoj kaj mizeruloj. Al tiu ordeno mi apartenas, fratoj kaprogardistoj, kaj al vi mi dankas la regalon kaj bonakcepton, kiun al mi kaj al mia armservisto vi faras: kaj kvankam laŭ natura leĝo ĉiuj vivantoj estas devigitaj favori la vagajn kavalirojn, la scio, ke vi, ignorante tiun devigon, bone min akceptis kaj regalis, tiom pli pravigas, ke mi per mia plej bona volonto dankas vian sindonecon.

Tutan tiun ĉi longan alparolon (kiun oni tre bone povus kaŝi kiel superflua) diris nia kavaliro, ĉar la donacitaj glanoj rememorigis lin pri la ora epoko; kaj al li venis deziro, fari tiun senutilan rezonadon antaŭ la kaprogardistoj, kiuj eĉ vorton ne respondante, aŭskultis lin mirigitaj kaj ravitaj. . . . .

*Esperantigis V. INGLADA.*

## EL ĈAPITRO XX

Nur povas esti certe, sinjoro mia, ke tiuj ĉi herboj nin certigas ke tie ĉi apude kuŝas kredeble ia fonto aŭ rivereto kiu ilin malsekigas; tial estus tre konvene, ke ni iom antaŭeniru, ĉar eble ni trovos ie ajn lokon, kie ni povos trankviligi tiun ĉi teruran soifon, treege nin laciganta, kaj kiu, sen ia dubo, kaŭzas pli gravan turmenton ol la malsato.

Ŝajnis al Don Kihoto oportuna la konsilo kaj prenante tuj buŝkondukilon de Rocinanto kaj Sanĉo kapĉirkaŭilon de sia azeno, metinte antaŭe sur ĝin manĝaĵojn

(1) *Lampaco*, hispane, *lampazo*: kreskaĵo kies latina nomo estas *gallium aparine*.



restintajn el noktomanĝo ili ambaŭ komencis vojiri supren tra la herbaro tre atente, ĉar la nokta senlumeco ne permesis al ili ekvidi ion ajn; sed apenaŭ estis ili vojirintaj proksimume ducent paŝojn, kiam ili ekaŭdis grandan akvobruadon, kvazaŭ ĝi enasbismiĝas de ia alta kaj malglata ŝtonegaro.

La bruado tre multe gajigis ilin, kaj haltinte por aŭskulti el kia flanko ĝi sonoris, ili aŭdis subite kaj tute neatendite fortan ekbruegon, kiu plene malaperigis al ili la kontenton pri la akvo, pli efike al Sanĉo, kiu kompreneble, estis nature timema kaj malmultanima; mi diras do, ke ili aŭdis, laŭ egalaj intertempoj, fortajn frapegojn kune kun ia krako de feraĵoj kaj katenoj, kiuj akompanitaj de l' furioza bruegado de la akvo estus tre certe kapablaj meti malkuraĝon en alian koron, krom tiu de Don Kihoto.

Kiel oni jam diris, estis tre malluma nokto, kaj okaze ili sin trovis tiam inter pintaltaj arboj, kies foliaro, blovita de dolĉa vento, faradis timigan bruetadon; tielo la soleco, la loko, la mallumo, akvobruo kaj murmuro de l' folioj, ĉio kunigite, treege terurigis, kaj tiom pli ke ili ja komprenis ke la batoj estis neĉesantaj, la vento ankoraŭ ĉiam blovanta kaj la mateno alvenonta, aldoniĝante al ĉio tio ĉi la nescio pri la loko kie ili staris.

Sed Don Kihoto akompanata de sia kuraĝega koro tuj saltis sur Rocinanton kaj brakoprenante la ŝildon metis pikegilon laŭbatale kaj ekdiris: «Sciu, Sanĉo amiko, ke laŭ volo de ĉielo mi naskiĝis en tiu ĉi fera aĝo por revivigi en ĝi tiun de oro aŭ sritan, kiel nomas ĝin ofte. Mi estas mem tiu, por kiu estas rezervitaj la danĝeroj, la orandan heroaĵoj, la kuraĝegaj agoj: mi estas, mi ĝin ripetas, tiu, kiu nepre revivigos gujn de *Ronda Tabulo*, tiujn *dekdu el Francujo* kaj la *naŭ de la Famo*; kiu forgesitios la Platire'ojn, Febo'jn kaj Belianis'ojn, kune kun la amaso de famaj vagirantaj gavaliroj el la pasinta tempo, farante en tiu ĉi, kiun mi vivas tiajn grandaĵojn, ktrangaĵojn kaj heroaĵoj ke tiuj ĉi entrepenoj tute malklarigos la plej klarajn faritajn de ili. Vi bone komprenas, tre fidela servisto, ke la mallumego de tiu ĉi nokto, ĝia stranga silentado, la muta kaj konfuza bruetado de tiuj ĉi arboj, la timiga bruego de tiu akvo, pri kies trovo ni klopodas kaj kiu ŝajnas surŝtone dispeciĝi kaj defali de la altaj lunaj montoj, kaj fine, tiu senĉesa batado kiu vundas kaj domaĝigas al ni la orelojn estas aferoj kiuj, kune aŭ po unu ĉiufoje, sufiĉas por enmeti malkuraĝon, timon kaj eĉ teruron en brusto de Marte-o mem, des pli en tiu kiu ne estas kutimigita vidi tielajn okazantaĵojn kaj aventurojn; sekve ĉio tio ĉi kion mi ĵus pentras al vi estas nur instigiloj kaj vekiloj por mia forta kuraĝo, tial ke jam al mi ŝajnas ke mia koro volas kvazaŭ sin krevigi en la brusto pro lia deziro ekkomenci tiun ĉi aventuron, kiom ajn malfacila ĝi prezentigis; tiel do, premu iom la selon de Rocinanto, restu kun Dio kaj atendu min tie ĉi nur dum tri tagoj, kaj se mi ne estus reveninta post tiu tempo vi reiru en nian vilaĝon, kaj por fari al mi bonagadon vi iru poste al Toboso, kie vi diros al nekomparebla sinjorino mia, Dulcineo, ke ŝia malliberiga kavaliro mortis nur por entrepreni aferojn kapablajn doni al li meritojn por povi fariĝi eterne ŝia.

Tradukis: RUFINO UNZAGA.

## EL ĈAPITRO XXV

Tiel parolante ili alvenis al la malsupro de alta monto, kiu preskaŭ kiel tranĉita ŝtonego estis sola inter multaj aliaj, kiuj ĉirkaŭis ĝin; kvietaj rivereto trakuris ĝian deklivaĵon kaj tuta ĝia rondeco estis herbejo tiel verda kaj foli plena ke ĝi konten-

tigis la okulojn kiuj rigardis ĝin; estis tie multaj arboj sovaĝaj kaj kelkaj kreskaj kaj floroj, kiuj igis la lokon tre agrabla.

Tiun ĉi lokon elektis la kavaliro de la Malgaja Figuro por pentofari kaj vidinte ĝin, li komencis diri laŭte, kvazaŭ li estus senprudenta: Tiu ĉi estas la loko, oh ĉielo!, kiun mi difinis kaj elektas por plori la malfeliĉon en kiu vi mem metis min; tiu ĉi estas la loko en kiu la larmoj de miaj okuloj pliigos la akvojn de tiu ĉi malgranda rivereto kaj miaj senintermankaj kaj profundaj ekĝemoj movos senĉese la foliojn de tiuj ĉi sovaĝaj arboj kiel atestaĵo kaj elmonro de la bedaŭro, kiun suferas mia disŝirita koro. ¡Oh, vi, kiuj ajn vi estas, kamparaj dioj kiuj havas vian loĝejon en tiu ĉi senhoma loko, aŭskultu la plendojn de tiu ĉi malfeliĉa amanto, kiun longa forestado kaj imagaj ĵaluzoj alportis por bedaŭri inter tiuj ĉi malglataĵoj kaj plendi pri la maldolĉa kondiĉo de tiu sendankema kaj bela virino, limo kaj fino de la tuta homa beleco! ¡Oh, vi, Napeoj kaj Driadoj kiuj kutimas loĝadi en la densejoj de la montoj; ke la, rapidaj kaj voluptemaj satirusoj, de kiuj vi estas amataj kvankam vane ne konjuru neniam vian dolĉan kvietecon, helpu min plendi mian malfeliĉon, aŭ almenaŭ ne tedigu aŭdi ĝin: ¡Oh, Dulcineo de Toboso, tago de mia nokto, gloro de mia bedaŭro, nordo de miaj vojoj, stelo de mia feliĉo, tiel la ĉielo donu ĝin al vi bonan, kiel vi deziras; ke vi konsideru la lokon kaj la staton al kiu via forestado kondukis min kaj ke bonvole korespondu al tiu, kiun oni ŝuldas al mia fido. Oh, solaj arboj, kiuj de hodiaŭ antaŭen kunvivos kun mia soleco, elmontru per la dolĉa movado de viaj branĉoj ke ne estas malagrabra por vi mia ĉeestado. Oh, vi, armilservisto, mia, agrabra kunvivanto en miaj feliĉaj kaj malfeliĉaj sukcesoj, konservu bone en via memoro tion, kion vidos al mi fari tie ĉi por ke vi rakontu ĝin al la tuta kaŭzo de ĉio tio. Kaj dirinte tion li desaltis de Rocinanto kaj tuj senigis lin je la enbuŝaĵo kaj la selo; kaj donante al li manplatbaton sur la postaĵojn diris al li: Libereson donas al ĉi tiu kiu restas sen ĝi, oh ĉevalo tiel bonega pro ciaj ellaboraĵoj kiel malfeliĉa pro cia sorto; deiru laŭ cia volo ke ci kunportas skribita sur la frunto ke ci estas pli rapida ol la Hipogrifo de Astolfo kaj la nomita Frontino, kiu tiel kara kostis al Bradamonto.

Vidinte tion Sanĉo, diris: Estu feliĉa kiu senigis al ni je la laboro senseligi la azenon, ĉar ne mankus manplatbatetojn por doni al ĝi kaj laŭdodirojn; sed se ĝi estus tie ĉi mi ne permesus ke iu ajn senseligu ĝin, . . . . .

... . . . . .  
 kaj vere, sinjoro kavaliro de la Malgaja Figuro ke se mia foriro kaj via frenezeco estas veraj, tiam estos bone reseli Rocinanton por ke ĝi anstataŭu la mankon de la azeno, ĉar tio estos ŝpari tempon por mia foriro kaj reveno, ĉar se mi piediros tiam mi ignoras kiam mi alestos kaj revenos, ĉar resume, mi estas malbona piediranto. Mi diras, Sanĉo, respondis Don Kinoto, ke tio estu kiel vi deziras, ĉar ne ŝajnas malbone al mi via propono, kaj mi diras ke post tri tagoj vi ekforiros, ĉar mi deziras ke dume vi vidos tion, kion pri ŝi mi faros kaj diros, por ke vi diru ĝin al ŝi. Kion pli multe mi havas por vidi, diris Sanĉo, krom tio kion mi jam estas vidinta? Vi estas prava kaj lerta, diris Don Kinoto: nun mankas al mi disŝiri miajn vestojn, disigi la armilojn kaj doni al mi kapfrapadojn kontraŭ tiuj ĉi ŝtonaĵoj, kune kun aliaj aferoj similaj, kiuj mirigos vin.

... . . . . .  
*Esperantigis: LUIS SÁNCHEZ.*

## EL ĈAPITRO XXVI

**Kie oni daŭrigas la amistajn ĝentilajojn, kiujn Don Kihoto faris en Sierra Morena (1)**

Kaj transirante al rakontado de tio, kion faris Don Kihoto kiam li sin vidis sola, diris la historio, ke tuj kiam li finis fari la ruloj kaj turniĝojn subduone nuda kaj suprdue vestita, kaj vidis, ke Sanĉo elforiras por ne atendi vidi pli da malsaĝaĵojn, tiam li iris en supron de alta ŝtonego kaj tie denove pripensis ĉion kion aliajn fojojn li estis pensinta, sen decido ĝin plenumi, nome kio estus pli bona kaj deca, ĉu imiti la strangajn frenezaĵojn faritajn de Roldano aŭ tiajn melankoliajn de Amadiso; kaj parolante al si mem diris: se Roldano estis tiel bona rajdisto kaj tiel brava, kiel ĉiuj diras, kia mirindaĵo, ĉar fine li estis ensorĉita, kaj nur oni povis mortigi lin enmetante al li dikan pinglon tra la pinto de la piedo, kaj li uzis ĉiam ŝuoj kun sep feraj alplandoj: tamen ne valoris al li ruziĝoj kontraŭ Bernardo de Karpio, kiu venkis lin kaj lin sufokis inter la brakoj en Roncesvalo; sed lasante aparte tion kio koncernas la braveco, ni transiru al lia senprudentiĝo kaj ja estas certe ke li perdis la prudenton sekve de la signoj kiujn li trovis en la fonton kaj de la sciigoj kiujn donis al li la paŝtisto.

... ali parte mi vidas ke Amadiso de Gaŭlujo ne perdante la prudenton kaj ne farante frenezaĵojn atingis tiom da famo kiel enamigita, kiom estas eble, ĉar tio kion li faris, laŭ lia historio, estis nur pro la malestimo de lia sinjorino Oriano, kiu estis ordoninta al li ke li ne aperu antaŭ ŝi ĝis tio plaĉos al li; ke li foriris al la Ŝtono Malriĉa kune kun ermito, kaj tie li ploratiĝis, ĝis la ĉielo helpis al li meze de lia plej granda malĝojo kaj bezono: kaj se tio ĉi estas vera kiel ĝi estas, por kio tio taŭgas ke mi senvestigu min tute kaj donu malĝojojn al tiuj ĉi arboj, kiuj ne faris al mi ian malbonon, kaj kial ankaŭ malklarigi la klaran akvon de tiuj ĉi riveretoj, kiuj donos ĝin al mi por trinki kiam mi soifos? Vivu la memoro de Amadiso kaj estu li imitata de Don Kihoto de Manĉujo ĉiel kiel li povos; kaj pri li oni diros kion pri la alia oni diris, nome, ke se li ne finis grandajn aferojn, li mortis pro ilia entrepreno, kaj se mi ne estas malakceptita nek malestimita de mia Dulcineo, tamen sufiĉas al mi, kiel mi jam diris, ke ŝi forestas. Ha! do, manojn al afero (2), venu al mia memoro agoj de Amadiso kaj instruu min, per kio mi devas komenci por imiti vin: sed mi jam scias ke li plej ofte preĝis kaj mi tiel ankaŭ faros; kaj servis al li kvazaŭ rozario, grandaj beroj de korka glanarbo kiujn li deknombre alligis, kaj kio ĝenis multe al li, estis tio ne trovi tie alian ermiton kiu povus prenu confeson al li, kaj kiu lin konsoligus, kaj tiel li distrigis promenante sur herbejeto, skribante kaj engravurante sur la ŝeloj de la arboj, kaj sur la sablo multajn versojn, ĉiuj alkonformaj al lia malĝojo, kaj iaj por laŭdado de Dulcineo; sed tiujn kiujn oni povis trovi plenaj kaj legeblaj post lia foriro de tie, estis la jenaj.

*Tradukis ĝin: ANDRÉS BRAVO DEL BARRIO.—Esp. 5.913.*

(1) Nomo de sudhispana montaro.

(2) Hispana popoldiro por montri tujsekvan agon.



EL ĈAPITRO XXXVIII

**Pritraktanta la kuriozan alparoladon, kiun Don Kihoto faris pri la armoj kaj la letroj (I)**

Daŭrigante Don Kihoto diris: ĉar mi komencas pri la studento per la malriĉeco kaj ĝiaj partoj, ni esploru ĉu la soldato estas pli riĉa, kaj ni vidos, ke nenio estas malpli riĉa ol li en la malriĉeco mem, ĉar li estas alligata al malsufiĉego de sia soldo, kiu alvenas malfrue aŭ neniam aŭ al tio, kion ili priŝtelos per siaj manoj kun rimarkinda danĝero je sia vivo baj konscienco, kaj ofte estas tiel granda lia seneco, ke survestaĵo ĉie traborita servas al li, kiel festa vesto kaj ĉemizo, kaj meze de la vintro, starante sur la kamparo je malbona vetero, li nur sin ŝirmas per la elspiraĵo de sia buŝo, kiu elvenanta el malplena loko, devas malgraŭ ĉio esti malvarma, kaj pri tio mi havas nenian dubon. Nu, atendu, ke li ankaŭ atendu la noktigon por ripozi je ĉiuj tiuj maloportunaĵoj sur la lito lin atendanta, kiu spite lia nekulpo neniam maltaŭgos pro mallarĝeco, ĉar li povos sur la tero okupi kiommulta ajn amplekso kaj turniĝadi laŭplaĉe, ne timante ke la littukoj malvastiĝu! Kaj jen alvenu la tago kaj horo, en kiu li ricevos la rangon de sia profesio, alvenu bataltago, kaj tie oni surmetos al li la rangĉapon, faritan el ĉarpio por kuraci lin je ia pafvundo, kiu eble trapasis al li la tempiojn aŭ difektis al li brakon aŭ kruron: kaj se tio ne okazos, kaj la kompata ĉielo protektos kaj konservos lin sanan kaj vivantan, tre kredeble li restos en la sama antaŭa malriĉeco, kaj estos necese, ke li atendu batalojn kaj batalojn kaj eliri venkante el ili, por ke li iom plialtrangiĝu, sed tiuj ĉi mirakloj okazas malofte. Sed, diru al mi, sinjoroj, se vi tion atentis: kiom malpli multenombraj estas tiuj rekompencitaj en militado, ol tiuj, kiuj en ĝi pereis? Sendube vi respondos, ke en tio komparo ne estas ebla, ke nekalkuleblaj estas la militmortintoj kaj la rekompencitajn oni povos kalkuli per nombro enhavanta ne pli ol tri ciferojn. Ĉio kontraŭe pri la letristoj ĉar per la enspezoj al sia profesioj, tute ne kalkulante la ricevitajn donacojn, ili povas vivadi: tiel, la laborado de soldato estas pli klopoda kaj tamen pli malgranda lia premio. Sed al tio oni povas aldoni, ke estas pli facile rekompensi du mil letristojn ol tridek mil soldatojn, ĉar tiujn oni premias difinante al ili oficon, kiun nepre oni devas doni al ilia profesio, kaj tiujn ĉi oni nur povas rekompenci per la bienoj de la mastro al kiu ili servas, kaj tia neebleco pli multe ankoraŭ montras, ke mi estas prava.

Sed ni aparte lasu ĉi tion, ĉar ĝi estas labirinto, el kiu oni eliras tre malfacile, kaj ni ree transiru al superrego de armoj super letroj: demando, kiu ankoraŭ estas elpruvota, tiel pravaj estas la argumentoj, kiujn oni prezentas ambaŭflanke; kaj inter tiujn, pretendas la letroj, ke sen ili la armoj ne povas stari, ĉar militado ankaŭ havas siajn leĝojn kaj de ili dependas, kaj la leĝoj estas interne de tio, kio estas letroj kaj letristoj. Al tio, respondas la armoj, ke la leĝojn oni ne povas sen ili starigi, ĉar per la armoj oni defendas respublikojn, konservas reglandojn, gardas urbojn, sendanĝerigas vojojn kaj senigas marojn je ŝiprabistoj, kaj fine, sen ili, la republikoj, la reglandoj, la monarkioj, la urboj kaj la maraj kaj teraj vojoj estus submetitaj al rigoreco kaj konfuzo, kiun kunportas militado, tempon dum kiu ĝi daŭras kaj havas eblon uzi el siaj privilegioj kaj fortoj, kaj estas ja elpruvite, ke oni estimas kaj devas plie estimi tion, kio plej kostas.

*Esperantigis ROMANO AYZA, stabestro de la 6<sup>a</sup> divizio.*

(I) Letroj—letras, lettres.

# DUA PARTO

## EL ANTAŬPAROLO

Dio min helpu, kaj kun kiom da deziro vi devas nun esti atendante, altranga leganto aŭ eĉ popola, ĉi tiun antaŭparolon, kredante trovi en ĝi venĝojn, disputojn kaj riproĉojn al aŭtoro de la dua Don Kihoto; mi diras pri tiu, kiu, laŭ oni diris embriiĝis en Tordesillas kaj naskiĝis en Tarragona. Sed vere ke mi ne donos al vi tian plezuron ke ĉar la ofendoj elvokas koleron en la plej humilaj animoj, en la mia trovos escepton tiu regulo. Vi volus ke mi difinu al li kiel azeno, malspritulo, kaj kuraĝulo; sed tio ne pasas tra mia penso; punu lin lia peko, kun sia pano li ĝin manĝu kaj tie li ĝin havu.

Tio, kiom mi ne povis ne bedaŭri, estas ke li al mi riproĉas esti maljuna kaj nur unbraka, kvazaŭ estus dependinta de mia mano haltigi la tempon kiu tiun ne pasus por mi aŭ se mia unbrakeco estus naskiĝinta en ia drinkejo kaj ne en la plej alta okazo, kiun vidis la pasintaj jarcentoj, la estantaj kaj esperas vidi la venontaj. Se miaj vundoj ne brilegas antaŭ la okuloj de tiuj, kiuj ilin rigardas, estas almenaŭ estimataj per la estimo de tiuj, kiuj scias, kie ili estas gajnitaj; ke la soldato montriĝas pli bone se li estas mortinta en batalo ol libera post forkuro kaj tio estas por mi tiamaniere, ke se nun oni proponus kaj faciligus al mi neeblaĵon, mi pli preferus esti min troviĝanta en tia mireginda batalokazo ol esti nun libera de miaj vundoj, post nepartopreno en ĝi; kiujn soldato montras en vizaĝo kaj brustoj, tiuj estas steloj gvidantaj la aliajn al honora ĉielo kaj deziro de ĝusta laŭdo, kaj oni devas averti, ke oni ne skribas per blankharoj sed per inteligento, kiu ofte pliboniĝas kun la jaroj.

Mi bedaŭris ankaŭ, ke li min nomas enviema, kvazaŭ al malsaĝulo li priskribas al mi, kio estas envio, ĉar reale kaj vere el du kiuj ekzistas, mi nur konas, tiun sanktan, noblan kaj bonintencan, kaj tio estante tiel, kiel ĝi estas, mi ne celas persekuti iun pastron kaj tiom pli, se li estas aldone inkvizicia ministro kaj se li diris tion pri kiu ŝajnas, ke li tion diris, li eraris tute, ke de tiu mi adoras spriton, admiras verkojn, kaj konstantan kaj virtan okupadon. Sed ja, mi dankas al tiu sinjoro aŭtoro, ke li diris ke miaj romanoj estas pli satiraj ol ekzemplaj, kaj tamen bonaj kaj ili ne povus esti tiaj se ili ne enhavus ĉion.

Ŝajnas al mi, ke vi diras ke mi agas tre modere kaj multe haltigis min ĉe miaj modestecaj limoj, sciante ke oni ne devas aldoni al bedaŭrulo bedaŭron, kaj tiu, kiun devas havi tiu sinjoro estas sendube granda, ĉar li ne kuraĝas aperi en senbara kampo kaj sub hela ĉielo, kaj li kovras sian nomon, anstataŭas sian patrujon kvazaŭ li estis farinta ian perfidon kontraŭ reĝeco. Se vi okaze konatiĝos kun li, diru al li ke mi ne estas ofendita, ke mi bone scias tion kio estas demonaj tentoj, kaj ke unu el la plej grandaj estas meti en inteligenton de ia viro, ke li povas verki kaj presigi libron, per kiu li gajnos tiom da famo kiom da mono, kaj tiom da mono kiom de famo; kaj por konfirmi tion ĉi mi volas ke per via bona sprito kaj belserco, rakontu al li tiun ĉi rakonton.

.....

*Esperantigis* RAFAELO DUYOS.

## EL ĈAPITRO XXXVI

## Letero de Sanĉo Pansa al Teresa Pansa, lia edzino.

Se bonajn skurĝojn oni donis al mi, bone rajdantan mi iris: se bonan regadon mi havas, bonajn skurĝojn ĝi al mi kostas. Tion ĉi vi ne komprenos nun Teresa mia, alian fojon, vi ĝin ŝcios. Vi devas scii, Teresa, ke mi decidis, ke vi veture iru, kio estas plej oportuna, ĉar ĉia alia irmaniero estas rampiĝo kvarpieda. Vi estas edzino de gubernistro, vidu, do, se iu mordetos viajn maleolojn (1). Jen mi sendas al vi verdan veston de ĉasisto, kiun donis al mi mia sinjorino, la dukino, ĝustarangŭ ĝin ke ĝi taŭgu kiel subjupo kaj korsaĵo al nia filino. Don Kihoto, mia mastro, laŭ mi aŭdis en tiu ĉi lando, estas saĝa frenezulo kaj sprita senprudentulo, kaj mi ne malsuperas lin. Ni estis en Montesinos subterejo kaj la saĝa Merlino prenis min por la malensorĉo de Dulcineo de Toboso, kiun tie oni nomas Alfonso Lorenzo. Per tri-mil tri-cent sen kvin skurĝoj, kiujn mi batos al mi, ŝi restos malensorĉata tute same kiel la patrino, kiu naskis ŝin. Pri tio nenion diru al iu, ĉar metu vi demanon pri ia afero kaj unuj diros, ke ĝi estas blanka, kaj aliaj, ke ĝi estas nigra. Post ne longe mi aliros al guberniejo, kien mi iros kun dezirego riĉiĝi, ĉar oni diris al mi, ke ĉiuj novaj regantoj komencas regadon kun tiu dezirego mem: mi pripensos la aferon de via alesto al mi, kaj mi avizos vin, ĉu vi tien venos aŭ ne. La azeno fartas bone, kaj sendas al vi multajn memoraĵojn, kaj mi ne pensas forlasi ĝin kvankam oni proponu al mi esti la granda turko (2). La dukino, mia sinjorino, kisas al vi milfoje la manojn; vi respondu per resendo de du mil, ĉar ne estas aĵo kiu malpli ĝenas nek kostas pli mal-kara, laŭ diras mia mastro, ol la bona ĝentileco. Dio ne volis havigi al mi alian valizon entenantan aliajn cent eskudo-jn (3) kiel tiu kiun mi trovis; sed vi ne bedaŭru, Teresa mia, ĉar sana estas kiu min protektas, kaj ĉion mi eltiros el regno; tamen mi havas grandan bedaŭron ĉar oni diras al mi ke se mi ĝin gustumos unu fojon, mi manĝos miajn manojn post ĝi (4), kaj se tio estus, ĝi ne kostus al mi tre malkare, kvankam la kriplitaj kaj nur unubrakaj ja havas sian feliĉon, ŝataĵon per la almozo, kiun ili petadas: tiel do, per unu aŭ alia vojo vi fariĝos riĉa kaj bonsorta. Dio ĝin donu al vi, laŭ Li povas, kaj Li gardu min por vin servi. En tiu ĉi kastelo la 20<sup>an</sup> de Julio de 1614.

Via edzo la guvernisto  
*Sanĉopansa.*

*Esperantigis A. J. L.*

- 
- (1) Murmuros de vi.  
(2) Turkia Imperiestro.  
(3) Malnova hispana monero.  
(4) Mi tre ŝatos ĝin.



## EL ĈAPITRO XLII

**Pri la konsiloj kiujn donis Don Kihoto al Sanĉo antaŭ li iris regi insulon, kaj aliaj aferoj bone pripensitaj.**

Pro la feliĉa kaj ŝerca sukceso de la aventuro pri la Doloritino estis tiel kontentigitaj la gedukoj ke ili decidis pasigi la mokaĵojn antaŭen rimarkinte la taŭgan personon kiun ili havas por ke li ilin prenun kiel veraj; kaj tial doninte la rimedon kaj ordonojn por ke iliaj servistoj kaj vasaloj gardu pri Sanĉo en la regado de la promesita insulo, alian tagon, tio estas la sekvantan el la flugado de Klavilenjo, diris la duko al Sanĉo, ke li ornamu kaj aranĝu sin por iri ekregi, ĉar jam iliaj insulanoj estis atendantaj lin kiel Majan akvon. Sanĉo humiliĝis, al li kaj diris: post kiam mi malsupreniris el la ĉielo, kaj de ĝia alta supro rigardis la teron, kaj vidis ĝin tiel malgranda, iom malgrandiĝis en mi la dezirego, kiun mi havis esti reganto; ĉar, kia grandeco esti regi mustardan grajnon, aŭ kia indeco aŭ imperio regi dekduonon da homoj, tiel grandaj kiel aveloj, ĉar al mi ŝajnis, ke ne estas pli multe da ili en la tuta tero. Se via moŝto bonvolus doni al mi tiometan parton da ĉielo, kvankam ne estus pli ol duono da leguo mi ĝin premus pli volonte ol la plej grandan insulon el la mondon.

Atentu, amiko Sanĉo respondis la duko, mi povas doni parton da ĉielo al neniu, kvankam ĝi ne estos pligranda al ungo, ĉar nur al Dio estas rezervataj tiuj donoj kaj favorojn: tion kion mi povas doni al vi, mi donas, nome plena insulo, ronda kaj bone proporciata, kaj eksterordinare fruktodona kaj sufiĉega, kie, se vi scias esti lerta, vi povos per la teraj riĉecoj akiri la ĉielajn.

Nu, respondis Sanĉo, venu al mi tiu insulo, kaj mi klopodos esti tiel guverniestro, ke malgraŭ malbonuloj mi iros la ĉielon; kaj tio ĉi ne estas pro avideco, kiun mi havu por eliri el mia ordinara loko nek por altramigiĝi, sed pro la deziro, kiun mi havas provi je kio ĝuas esti reganto. Se iam vi tion provos, Sanĉo, diris la duko vi manĝos al vi la manojn post la regado ĉar estas dolĉega afero, ordoni kaj esti obeata. Certe kiam via mastro sukcesos esti imperiestro, kaj tio estos sendube, laŭ la irado de liaj aferoj, oni ne tion forprenu al li kaj li doloru kaj malĝoju el la tuta animo pro la tempo dum kiu ĉesis tion fari.

Sinjoro rediris Sanĉo, mi imagas, ke estas bone regi eĉ nur brutareton: kun vi enterigu min, Sanĉo, ke vi scias pri ĉio, respondis la duko kaj mi esperas, ke vi estos tiel bona reganto kiel via saĝo promesas, kaj tie restu tio ĉi; kaj atentu ke morgaŭ mem vi devas aliri regi la insulon, kaj hodiaŭ vespere oni aranĝos vin pri la deca kompleto, kiun vi devas vesti, kaj ĉiuj objektoj necesaj al via eliro. Oni vestu min, diris Sanĉo, iel ajn ĉar iel ajn mi estos vestita, mi estos Sancho Panso. Tio estas vera diris la duko, sed las vestoj devas alkonformigi al la ofico aŭ indecon, kiun ĉiu plenumas, ĉar ne estus bone, ke juristo sin vestu kiel soldato, nek soldato kiel pastro. Vi Sanĉo, estos vestita parto kiel advokato kaj parto kiel kapitano, ĉar en la insulo kiun mi donas al vi, tiel oni bezonas la armilojn kiel la literojn, kaj la literojn kiel la armilojn. Literojn, respondis Sanĉo, mi malmultajn havas ĉar ankoraŭ mi ne scias la A B C sed sufiĉas al mi havi la *Christus-on* en memoro por esti bona reganto. Pri la armiloj mi scias manuzi tiujn kiujn oni donos al mi ĝis ilin defalos el miaj manoj, kun helpo de Dio. Per tiel bona memorado diris la duko, ne povos Sanĉo erari pri nenio.

Tiam alvenis Don Kihoto, kaj eksciante pri tio kio okazas kaj la urĝon je kiu Sanĉo devas tuj foriri por ekregi, forpermesita de la duko, li prenis lin per mano kaj kondukis lin en sia loĝejon kun intenco kunsili al li, kiel li devas konduki en sia

ofico. Post eniro, do, en la ĉambron, li fermis la pordon, preskaŭ perforte sidigis Sanĉon apud li, kaj per trankvila voĉo diris al li:

Senfinajn dankojn mi donas al la ĉielo, Sanĉo amiko pri tio ke antaŭ ol mi estas trovinta ian bonan feliĉon, la neesperita bona sorto eliras ricevi kaj renkonti vin. Mi kiu ĉe okazo de mia bona sorto estas antaŭdoninta al vi la pagon de viajn servoj mi vidas min ĉe la komenco de mia altrangiĝo kaj vi antaŭtempe, kontraŭ la leĝo de rezona prielpenso, vidas vin premiata je viaj deziroj. Aliaj subaĉetas, ĝenas, subpostulas, frumatenas, petegas, obstinas kaj ne atingas tion kion ili pretendas; kaj jen alvenas alian kaj ne sciante kiel, sin renkontas kun la rango kaj ofico, kiun multaj aliaj pretendis, kaj tie ĉi venas ĝustatempe la diron, ke estas bona kaj malbona okazsukceso en la pretendoj. Vi, kiu, laŭ mia penso estas, sen ia dubo, krudulo, sen fruematenado nek sendormado kaj per l'espiraĵo kiu tuŝi vin de la iranta kavalireco, sen tialo, vidas vin reganto de insulo, same kvazaŭ ĝi estus bagatelo. Ĉion mi diras, Sanĉo, por ke vi ne difinu al viaj indoj la ricevitan favoron, sed por ke vi danku ĉielon, kiu dolĉe aranĝas la aferojn, kaj post tio vi dankos al la grandeco kiun en si enhavas la oficon de la vaga kavalirado. Preta, do, la koro kredi tion, kion mi al vi diris, estu, filo, atenta al tiu ĉi via Katon'o kiu volas konsili vin kaj esti nordo kaj gvido, kiu vin alvojirigos kaj kondukos al senriska haveno, el tiu ĉi ventega maro kien vi eniĝos ĉar la oficoj kaj altaj rangoj ne estas alia afero ol profunda golfo je konfuzoj.

*Esperantigis 10.072.*

Unue, ho filo, vi devas timi Dion; ĉar en Lin timi konsistas la saĝeco; kaj estante saĝulo, vi povas en nenio erari.

Due, vi devas konsideri tion kio vi estas, celante vin mem koni, kio estas la plej malfacila konado kiun oni povas imagi. El vin koni, elvenos ne ŝveli kiel la rano, kiu volis egali kun bovo; ĉar se vi ĉi tion faras, la konsiderado esti gardinta porkojn en via lando, fariĝos malbelaj subportiloj de la rado de via frenezeco. Tiel estas la vero, respondis Sanĉo, sed tio okazis kiam mi estis knabo; sed poste, iom vireto, tio kion mi gardis estis anasoj, neniel porkoj; sed ŝajnas al mi ke ĉi tio ne rilatas la okazon, ĉar ĉiuj kiuj regas ne elvenas el kasto de reĝoj. Tiel estas la vero, respondis Don Kihoto; tial, kiuj ne estas el nobelorigino, tiuj devas akompani la gravecon de la ofico kun kvieta malsevereco kiu, gvidate de la saĝeco, ilin liberigu de malica murmurado, de kiu nenia stato liberigas.

Fanfaronu, Sanĉo, la humilecon de via origino, kaj ne hontu dirante ke vi elvenas el terlaboristoj; ĉar vidante ke vi ne koleretas, neniue ekkolerigetos vin; kaj pli vin estimu esti humila virtulo ol malhumila pekulo. Estas nekalkuleblaj tiuj kiuj, naskiĝinte el humila origino, atingis la plej altan rangon papan kaj imperiestran, pri kies vero tiom da ekzemploj mi povas prezenti al vi, ke ili vin lacigus.

Atentu, Sanĉo; se vi prenas por rimedo la virton, kaj vin estimas fari virtaĵojn, vi ne devas envii tiujn kiuj havas ilin, principoj kaj nobeloj; ĉar la sangon oni heredas, kaj la virton oni akiras, kaj la sola virto valoras tion kion ne valoras la sango.

Tiel estante ĉi tio, kiel ĝi estas, kiam vi estos en via insulo, se okaze alvenus por vin vidi ia el viaj parencoj, ne lin malakceptu nek lin hontigu; kontraŭe, vi devas lin akcepti, lin festi kaj lin regali, ĉar per ĉi tio vi kontentigos la ĉielon, kiu ŝatas ke neniue hontu pro tio kion faris, kaj vi respondos al tio kion vi ŝuldas al la tre ordigita naturo.

Se venigus vian edzinon ĉe vin (ĉar ne estas bone ke tiuj kiuj plenumas longdaŭrajn regadojn ne havu la sian propran), eduku ŝin, instru ŝin, kaj ŝin senigu de ŝia natura malafableco; ĉar ĉion kion saĝa registro kutimas akiri, kutimas perdi kaj disŝuti malĝentila kaj malsaĝa edzino.

Se okaze vi vidviĝus (kiel povas okazi), kaj per la ofico vi pliboniĝus je edzino,



ne ŝin elektu tia ke ŝi utilu al vi por fiŝhoĝo kaj fiŝkano, kaj por via «mi ne volas»; ĉar vere mi diras al vi ke pri ĉio tio kion ricevis la edzino de juĝisto, devas doni konton la edzo en la universala loĝejo, kie pagos kun procento en la morto la sumojn kiujn li ne notis dum sia vivado.

Neniam vin gvidu per la trudleĝo, kiu kutimas havi multan enhancecon, ĉe la nesciuloj kiun fanfaronas de sprituloj.

La larmoj de malriĉulo trovu en vin pli kompaton, sed ne pli justecon, ol la enketoj de riĉulo.

Celu eltrovi la veron tra la promesoj kaj donacoj de riĉulo, kiel tra la ĝemploroj kaj malspritaĵoj de malriĉulo.

Kiam povos kaj devos okazi la justeco, ne apliku la tutan leĝan severecon al kulpulo; ĉar ne estas pli bona la famo de severema ol tiu de kompatema juĝisto.

Se okaze vi pardonus, ke tion ne faru pro la pezo de donaco, sed pro tiu de kompatato.

Kiam al vi okazos juĝi kelkan proceson de ia malamiko via, deturnu vian penson de via plendo, kaj metu ĝin en la veron de la fakto.

Ne vin blindigu la propra pasio en la malpropra domo; ĉar la erarojn kiujn en ĝi vi faros, ne estos korekteblaj multafoje; kaj se ili estus tiel, tio okazus kun perdo de via kredito kaj eĉ de via havo.

Se bela virino alvenus postuli de vi justecon, deturnu la okulojn de ŝiaj larmoj kaj la orelojn de ŝiaj ĝemoj, kaj pripensu malrapide la esencon de tio kion ŝi postulas, se vi ne volas ke via prudento dronu en ŝian ploradon, kaj via boneco en ŝiajn ekĝemojn.

Ne traktu malbone per paroloj tiun kiun vi devas puni per faktoj; ĉar sufiĉas al la malfeliĉulo la sento de la puno, sen la alĉono de malbonaj rezonadoj.

Kulpulon kiun vi devos juĝi, konsideru mizerulo, submetita al la kondiĉoj de nia malĉasta naturo; kaj en ĉio tio kion vi povos, ne farante insulton al la kontraŭulo, elmontru vin kompatema kaj pardonema antaŭ li; ĉar kvankam estas egalaj ĉiuj diaj perfektecoj, pri brilas kaj sin elmontras al nia vidado tiu de la kompatato ol tiu de la justeco.

*Tradukis: MANUEL BENAVENTE (6722).*

Se tiujn ĉi ordojn kaj tiujn ĉi rekulojn vi sekvos, Sanĉo, viaj tagoj estos multenombraj, via famo senfina, viaj premioj egigaj, via feliĉeco ne direbla, vi edzigos viajn gefilojn kiel vi volos, nobeltitolojn havos ili kaj viaj genepoj, vi vivos pace kaj plaĉe je la homoj, kaj en la lastaj paŝoj de la vivo atingos vin ĵiu de la morto en dolĉega kaj matura maljuneco kaj malfermos viajn okulojn la molaj kaj delikataj manoj de viaj pranepetoj. Tiujn ĉi, kiujn ĝis tie ĉi mi diras al vi, estas la dokumentoj kiujn ornamos vian animon; aŭdu nun tiujn kiuj estas taŭgaj por ornamo de la korpo.

*Esp. 10.072.*

## EL ĈAPITRO LI

### Letero de Don Kihoto de la Manĉo al Sanĉo Panza, estro de la insulo Baratario

Kiam mi atendis aŭdi novaĵojn de cia maldiligenteco kaj enuigeco, Sanĉo amiko, mi aŭdis ilin de cia prudenteco, pro kio mi dankis speciale la ĉielon, kiu per la sterko scias riĉigi la malriĉulojn kaj el la naiveguloj fari saĝulojn. Oni diras al mi, ke ci regas kiel se ci estus homo, kaj ke ci estas homo kiel besto, laŭ la humilo per



kiu ci zorgas cin; kaj mi volas ke ci sciu Sanĉo, ke multajn fojojn decas kaj estas necese pro la aŭtoritateco de la ofico, agi kontraŭ la humileco de l' koro, ĉar la bonornamo de la persono kiu estas ĉe gravaj oficoj, devas konformiĝi al tio kion ili bezonas, kaj tute ne laŭ lia humileco. Vestu cin dece, ĉar ŝtupo ornamita ne ŝajnas ŝtipon; mi ne diras ke ci ornamu cin per ormedalionoj nek galanterioj, nek ke estante juĝisto vestu cin kiel soldaton, sed ke ornamu cin per la kostumo, kiu al cia ofico decas, kondiĉe ke ĝi estu pura kaj bonordigita. Por logi la volonton de la popolo kiun ci regas, inter aliaj ci devas plenumi du faktojn; la unu esti bonkondata pri ĉiuj, kvankam tion ĉi alifoje mi jam diris al ci; kaj la alia peni por la multhavo de la nutraĵoj, ĉar estas nenio kiu pli tedu la koron de ĉiu malriĉulo ol la malsato kaj nehavo.

Ne verku multajn leĝojn, kaj se ci faras tion, penu por ke ili estu bonaj, kaj precipe ke oni obeu kaj plenumu ilin; ĉar la leĝoj kiujn oni ne plenumas, estas kvazaŭ ili ne estus; kontraŭe ili komprenigas ke la reganto kiu havis saĝecon kaj aŭtoritaton por verki ilin, ne havis kuraĝon por plenumigi ilin, kaj la leĝoj kiuj timigas kaj kiujn oni ne obeas, estas kiel la trabo, reĝo de la ranoj, kiu en la komenco timegigis ilin kaj per la tempo ili malestimis ĝin, kaj supreniris sur ĝin. Ci estu patro de la virtoj kaj duonpatro de la malvirtoj. Ne estu ĉiam severa nek ĉiam malsevera, kaj elektu la mezon inter tiuj ĉi du ekstremoj, ke en tio ĉi estas la punkto de la saĝeco. Vizitu la malliberejojn viandovendejojn kaj halojn; ĉar la ĉeesto de la reganto en tiaj ejoj estas multgrava, konsolas la malliberulojn kiuj atendas siajn baldaŭajn liberigojn, estas fantomo por la buĉistoj kiuj tiumomente egaligas la pezilojn, kaj estas timigilo por la halovirinoj pro la sama motivo. Ne elmontru cin (kvankam okaze ci estu tiel, kiom mi ne kredas) ambiciema, virinamema, nek manĝegema, ĉar sciante la popolo kaj cial cirkaŭuloj cian definitan emon, per ĝi ili atakos cin, ĝis faligi cin en la profundon de l' pereco. Rigardu kaj rerigardu, legu kaj relegu la konsilojn kaj dokumentojn, kiujn mi donis al ci skribe, antaŭ ol ci foriris el tie ĉi al cia regejo, kaj ci vidos, ĉu ci konservas ilin, kiel ci trovas en ĝin helpon, kiu elportas la oferetojn kaj malfacilaĵojn, kiujn ĉe ĉiu momento havas la regantoj. Skribu al cial sinjoroj kaj elmontru cin dankema al ili, ĉar la maldanko estas filo de la malhumilo, kaj unu el la plej gravaj pekoj kiujn oni konas, kaj la persono kiu estas dankema al tiuj kiuj faris bonon al li, prezentas emon, ke li ankaŭ tiel estos al Dio, kiu tiom da bonaĵoj faris kaj seninterrompe faras al li. Ŝia moŝto la grafino foririgis senditon kun cia kostumo kaj alia donaco por cia edzino Tereso Panza: ĉiuminute ni atendas respondon.

Mi estis iomete malsana pro vundeto ĉe mia nazo, sed ĝi estas nenio, ĉar se estas sorĉistoj kiuj malbone kondutas pri mi, ankaŭ estas kiuj defendas min. Avizu min ĉu la servistestro kiu estas kune kun ci, partoprenis en la okazintaĵoj de Trifaldo kiel ci suspektis, kaj pri ĉio kio okazos al ci, laŭ okaze avizos min, ĉar la vojo estas mallonga; des pli ĉar mi intencas forlasi baldaŭ tiun ĉi senokupan vivadon ĉe kiu mi estas, ĉar mi tute ne naskiĝis por ĝi. Oni proponis aferon al mi, kaj mi kredas ke ĝi metos min malgracie por tiu ĉi sinjoroj; sed kvankam mi ŝategas ĝin, mi tute malŝatas ĝin, ĉar fine, ĉe la fino mi devas plenumi plibone mian profesion ol ilian deziron; konforme al tio kion oni kutime diras: «*Amicus Plato sed magis amica veritas*». Mi diras al ci tiun ĉi latinaĵon, ĉar mi kredas ke ci devas esti lerninta ĝin post esti reganto. Kaj mi rekomendas cin al Dio, kiu volu protekti cin de tio ke neniu kompatu cin.

Cia amiko

*Don Kihoto de la Manĉo.*

Esperantigis: JUAN ROS SUDRIÁ.

## EL ĈAPITRO LII

## Letero de Tereso Pansa al Sanĉo Pansa, ŝia edzo.

Vian leteron mi ricevis, Sanĉo de mia animo (1), kaj mi promesas kaj ĵuras al vi kiel katolika kristanino, ke ne tre malmulte mankis al mi por freneziĝi pro gajeco. Atentu, frato, kiam mi ekaŭdis, ke vi estas guvernisto mi pensis tuj fali, sveninta pro ĝojego, ĉar vi bone scias ke oni diras, ke same mortigas subita gajaĵo kiel granda bedaŭro. Sanjo, via filino, uriniĝis, sen sia scio, pro kontentego. Mi havis antaŭ mi la veston kiun vi sendis al mi kaj ĉirkaŭ la kolo, la koralojn kiuj sendis al mi mia sinjorino la dukino, kaj la leterojn en la manoj, kaj ilia portinto tie ĉeestis. Kaj malgraŭ ĉio mi kredis kaj mi pensis ke estas revaĵo tio, kion mi vidis kaj tuŝis; ĉar, kiu povu pensi ke kaprogardiston povas fariĝi reganto de insuloj? Vi, scias, amiko, ke diris mia patrino ke estas bezone multe vivi por multe vidi: mi tion diras, ĉar mi intencas pli vidi, se mi pli vivos, ĉar mi intencas ne resti trankvila ĝis mi vidos vin fiarmulo aŭ imposta enspezisto, oficoj enportebaj de la diablo por kiu malhoneste ĝin uzas sed kiuj fine, fine ĉiam havas kaj mantenas monon. Mia sinjorino la dukino diros al vi la deziron, kiun mi havas iri kortegon: pensu pri tio malrapide, kaj avizu min, pri via bonvolo, ĉar mi penos por honori vin tie veturirante.

La pastro, la barbiro, la abituriento kaj eĉ la preĝejservisto, ne povas kredi ke vi estas guvernisto, kaj diras ke ĉio estas trompo, aŭ sorĉaj aferoj, kiel estas ĉiuj de Don Kihoto via mastro: kaj diras Sanson ke li iros serĉi vin kaj eltiri al vi la guvernion el la kapo, kaj al Don Kihoto la frenezon el la lia: mi aŭdante tion nur vidas kaj rigardas mian koralan ĉirkaŭkolon, kaj okupas min pri la vesto kiun profitante la vian, mi devas fari al nia filino. Glanojn mi sendis al mia sinjorino la dukino. Vi sendu al mi kelkajn trametojn da perloj se oni ilin uzas en tiu insulo. La tieaj sciigoj estas, ke Berrueca' ino, edzigis sian filinon kun fipentristo, kiu alvenis tiun ĉi vilaĝon pentri kio ajn. La estraro ordonis al li pentri la insignojn de Lia Mosta Reĝo sur la pordoj de la urbestrejo, li petis du dukatojn (2) oni antaŭpagis ilin al li, li laboris ok tagojn, post kiujn nenion li pentris, kaj diras ke li ne sukcesas pentri tiom da malgrandaĵoj: li redonis la monon, kaj malgraŭ ĉio tio, li edziniĝis kvazaŭ bona metiisto: vero estas tamen, ke jam li forlasis la pentrilon kaj prenis la fosilon kaj iras kampon kiel fortika terlaboristo.

La filo de Petro Lobo ricevis unuaj sanktrelegiajn gradojn, en la intenco fariĝi pastro; tion sciis Mingilla la nevino de Mingo Silvato, kaj prezentis pledon pro tio ke li promesis al ŝi edzigi kun ŝi per sia honoro: malbonajn kalumnioj kvazaŭ diras ke ŝi estis gravediĝinta je li: sed li tion firme neas.

En tiu ĉi jaro ne estas olivoj, nek oni trovas guton da vinagro en tiu ĉi vilaĝo Tra tie trapasis roton; la soldatoj samtempe enportis kun si tri tieajn knabinojn: mi ne volas diri al vi kiuj ili estas, eble ili revenos, kaj ne mankos kiuj prenos ilin por edzinoj kune kun ilia konduto bona aŭ malbona. Sanjo faras puntaĵojn ŝi gajnas ĉiutage ok maravedis-ojn (3) netajn, kiujn ŝi enkasigas en monujon por helpi al sia vestaro; sed nun, kiam ŝi estas guvernista filino, vi donos al ŝi la dotaĵon sen neceso

(1) Hispana karesa esprimo por montri estimon, tute same tiel oni diras Esperante: mia kara, k. t. p.

(2) Malnova hispana monero.

(3) Malnova supozita hispana monero.



ŝi pro tio laboru. La placa fontano ŝekiĝis; fulmon falis sur ĥokpendigon, kaj volu Dio ke tie mi ricevu ĉiujn batojn. Mi atendas respondon al tiu ĉi letero kaj la solvon pri mia eniro kortegon; kaj je tio ĉi Dio gardu vin pli jaroj ol al mi, aŭ la saman nombron, ĉar mi ne volus lasi vin sen mi en tiu ĉi mondo.

Via edzino

*Teresa Pansa.*

.....  
*Tradukis* LUIS JIMÉNEZ-ALFARO.

## EL ĈAPITRO LXXI

.....  
 Fine ili eniris en foliplenan arbaron starantan ne malproksime de la vojo, kie desaltinte de Rocinante' kaj de l'azeno, ili kuŝiĝis sur la verdan herbon, kaj noktomanĝis el la provizaĵoj de Sanĉo, kiu farante fortan kaj flekseblan vipilon el la azengvidila ŝnuro, apartigis sin ĝis dudek paŝoj de sia mastro en fagaron. Don Kiĥoto, kiu vidis lin kuraĝege kaj potence deirantan, diris al li:—Aŭskultu, amiko, ne dispecigu vin; donu tempon al la vipbatoj por ke unuj atendu la aliajn; volu ne akceli tiel vian agadon ke, en ĝia mezo manku al vi la elspiraĵon. Mi deziras diri, ke ne vipu vin tiel forte, ke manku al vi la vivo antaŭ ol atingi la nombron deziratan; kaj por ke vi ne perdu pli aŭ malpli, mi kalkulos per tiu ĉi mia rozario, la vipbatojn, kiujn vi donos al vi.

—La ĝusta paganto ne bedaŭras garantiaĵojn, respondis Sanĉo, mi pensas vipi min tiamaniere ke, ne mortigante min mi doloriĝos, ĉar tio devas esti la celo de la miraklo.

Li senvestigis sin tuj de la talio supren, kaj forprenante la ŝnuron ekbatis sin kaj Don Kiĥoto komencis la kalkulon de la vipbatoj. Sanĉo estis kredeble batinta al si ses aŭ okfoje, kiam ŝajnis al li enuiga la ŝanco, kaj tre malkara ĝia prezo, kaj haltante iom, li diris al sia mastro, ke li trompiĝis, ĉar ĉiu vipbato el tiuj, meritis esti pagata per duono da realo, sed ne per kvarono.

—Daŭrigu, Sanĉo amiko, kaj ne senkuraĝiĝu, diris Don Kiĥoto al li, ke mi duobligas la prezon.—Tiamaniere, respondis Sanĉo, ke Dio helpu min, kaj pluvu vipbatoj!; sed la fripono ne batis sin plu sur sian dorson kaj batis sur la arbojn, kun tiaj ekĝemoj de tempo al tempo, ke-ĉe ĉiu el ili ŝajnis ke lia animo elŝiriĝis al li. Malmoliĝanta tiu de Don Kiĥoto, timanta la finon de lia vivo kaj la malsukceson de sia deziro, pro la malprudenteco de Sanĉo, diris al li:—Je via vivo, Sanĉo, ke tiu afero restu en tiu ĉi punkto, ĉar ŝajnas al mi tre malplaĉa tiu medikamento, kaj estos bone doni tempon al la tempo, ke oni ne almilitis Zamora'on en unu horo. Pli ol mil batoj, se mi ne kalkulis erare, vi donos al vi; ili estas nun sufiĉaj, ke la azeno (parolante maldelikate), suferas la ŝarĝon, sed ne la superŝarĝon.

—Ne, ne, sinjoro, respondis Sanĉo, oni ne diros pri mi, ke ricevinte la pagon, mi ne plenumas mian devon; apartigu vin ree, kaj permesu al mi denove bati min almenaŭ mil vipbatojn, ĉar per du taskoj kiel tiuj ĉi, oni plenumos la ŝuldon kaj ankoraŭ malmankos io. Ĉar vi estas tiel pretema, diris Don Kiĥoto, la ĉielo helpu vin, ke mi malproksimiĝas. Sanĉo rebatis sin, kun tiom da kuraĝo, ke li jam estis senŝeliginta multajn arbojn; tia estis la rigoreco per kiu li vipbatadis sin; kaj ekkriegante unufoje, kaj donante grandegan vipbaton sur fagon, li diris: Ĉi tie mortos Sanson' kaj ĉiuj siaj kunestantoj.

Alkuris tuj Don Kiĥoto pro la kompatinda voĉo, kaj pro la bato de la rigora vipo, kaj kaptante la torditan azengvidilon, kiun Sanĉo uzis kvazaŭ bovaĵvergo



diris al li:—Ne permesu la sorto, Sanĉo amiko, ke por mia gusto, vi perdu la vivon kiu taŭgas por zorgi pri via edzino kaj infanoj; atendu Dulcinea' pli bonan okazon, ke mi restos ĉe la limoj de la proksima espero, kaj atentos ke vi akiros novajn fortojn, por ke tiu ĉi afero finiĝu kontentigante ĉiujn.—Ĉar via moŝto tion deziras, estu bone, respondis Sanĉo, kaj surmetu al mi sur mian dorson, vian mantelon, ĉar mi ŝvitas kaj ne volus malvarmumi, tial ke la novicaj vipbatantoj povas ricevi tiun danĝeron. Don Kihoto tion faris, kaj tute nudiganta, li ŝirmis Sanĉon, kiu dormiĝis ĝis la suno vekis lin, kaj poste ambaŭ daŭrigis sian vojiron, ĝis ili alvenis en lokon malproksiman je tri mejloj.

*Esperantigis A. L. VILLANUEVA.*

## EL ĈAPITRO LXXIV

### Pri la malsanado de Don Kihoto lia testamento kaj lia morto

Ĉar la homaj aferoj ne eterne daŭras, kaj iras ĉiam kliniĝante de sia komenco ĝis ili atingas sian lastan finon, precipe la homaj vivoj, kaj ĉar Don Kihoto ne havis privilegion de l' ĉielo por haltigi la pasadon de la sia, alvenis ĝia fino kaj neniigo, kiam li malpli pensis pri tio: tial ĉu pro la melankolio kiu kaŭzis al li sin vidi venkitan, ĉu pro la aranĝo de la ĉielo, kiu ĝin tiel ordonis, enradikiĝis al li unu febro, kiu devigis lin kuŝadi sur la lito ses tagojn, dum kiuj li ofte estis vizitata de l' pastro, de la abituriento kaj de la barbiro, liaj amikoj, kaj ankaŭ ne apartiĝis de lia kap-kuseno Sanĉo Panza, lia bona ŝildportisto.

La kuracisto opiniis ke melankolioj kaj malplezuroj finas lin. Petis Don Kihoto, ke oni lasu lin solan, ĉar li volas dormi iom.

Ili tion faris, kaj li dormis, laŭ vulgara diro «per unu ekpuŝo», pli ol ses horojn, tiom ke la guvernistino kaj la nevino pensis ke li finiĝos dum sia dormado. Li vekigis post la dirita tempo, kaj tre laŭtvoĉe diris: «Estu benata la multepova Dio, kiu tion da bono faris al mi! Ja, liaj kompatoj ne havas limon nek malgrandigas nek malpermesas ilin la pekoj de la homoj». La nevino atentis la dirojn de la onklo kaj ŝajnis al ŝi pli bonsencaj ol tiuj, kiuj li kutimis diri, almenaŭ dum tiu malsanado, kaj demandis al li: «Kion via moŝto diras, sinjoro? Ĉu io nova okazas? Kiaj kompatoj estas tiaj, aŭ kiaj la pekoj de la homoj?»

La kompatoj, respondis Don Kihoto, estas kiuj dum tiu ĉi momento uzis Dio por mi, kiujn, laŭ mia diro, ne malhelpis miaj pekoj. Mi jam havas prudenton liberan, kaj klaran, sen la malhelaj ombroj de la nesciado, kiuj en ĝi metis mia maldolĉa kaj senĉesa legado de l' malamegindaj libroj de kavaliraĵoj. Mi jam konas iliajn sensencaĵojn kaj delogojn kaj nur tio ĝenas min ke tiu senerariĝo alvenis tiel malfrue, ke ĝi ne lasas al mi tempon por elfari ian kompenson, legante aliajn, kiuj estas lumo por la animo. Mi sentas ke mi estas ĉe la morto: mi volus morti tiamaniere ke ĝi komprenigu, ke mia vivo ne estis tiel malbona por ke mi postlasu famon de frenezulo: ĉar kvankam mi tia estis, mi ne volus firmigi tiun veron per mia morto. Alvoku, amikino, la pastron, la abiturienton Sansonon Karaskon kaj majstron Nikolaon, la barbiro, ĉar mi volas konfesi kaj testamenti. Sed tiun penon ŝparis al la nevino la tuja eniro de la tri.

Apenaŭ Don Kihoto ilin vidis, tiam li diris: «Gratulu min, miaj bonaj sinjoroj, tial ke mi jam ne estas Don Kihoto de Manĉujo sed Alonso Kihano, kiun miaj moroj alnomigis la bona. Mi jam estas malamiko de Amadiso de Galujo, kaj de ĉiu senfina

fiarego de lia raso: jam estas por mi malamegindaj ĉiuj profanaj historioj de la aventuremaj kavaliroj: mi jam elkonas mian malsaĝecon kaj la riskon en kiu mi metis min, tial ke mi ilin legis: jam pro la Dia kompato, mi abomenas ilin, severe korektita sur mia kapo. Kiam tion ĉi la tri aŭdis, ili sendube pensis ke ia nova frenezo elprenis lin. Kaj Sansono diris: «Nun, sinjoro Don Kihoto, kiam ni eksciis, ke fraŭlino Dulcinea jam estas senensorĉigita, ĉu tion diras via moŝto? Kaj nun, kiam ni estas ĵus fariĝontaj paŝtistoj, por pasigi nian vivon kantante kvazaŭ princoj, deziras via moŝto ermitigi? Silentu, pro via vivo, pripensu kaj forlasu fabelojn».

«Tiujn ĝisnunajn, rediris Don Kihoto, kiuj estis veraj por mia malprofito, aliigos mia morto, kun helpo de l' ĉielo, al mia profito. Mi, sinjoroj, sentas ke mi mortas rapidege: ni forlasu la ŝercojn kaj alportu al mi konfesprenanton por ke mi konfesu, kaj notario, kiu skribu mian testamenton, ĉar en tiaj okazoj ne devas moki la homoj pri sia animo: kaj tial, mi petas ke dum mi konfesos antaŭ la sinjoro paroĥestro, vi iru al aktisto. Ili interrigardadis unu la alian, mirigitaj de la diroj de Don Kihoto, kaj kvankam dubemaj, ili volis lin kredi kaj unu el kaŭzoj pro kiu ili pensis, ke li estas mortonta, estis ke li tiel facile revenis de frenezo en prudenton, ĉar al la rezonoj jam diritaj, li aldonis multajn aliajn, tiel bone elmetitajn kaj kristanajn kiel pravajn, kiuj tute forpreni el ili la dubon, kaj kredigis ke li havas saĝon. La pastro foririgis la ĉeestantojn, restis sola kun li, kaj konfesprenis lin. . . . .

. . . . . Fininte la konfesprenon eliris la pastro dirante: «Certe li mortos, kaj certe estas prudenta Alfonso Kihano, la bonulo: ja ni povas enveni por ke li testamentu».

. . . . . Tiel li finis la testamenton, svenis kaj etendiĝis sur sia lito. Ĉiuj tumultis kaj alestis por la helpo, kaj dum la tri tagoj, kiujn li travivis, post kiam li testamentis, ofte svenis. La domo estis maltrankvila, sed tamen, manĝadis la nevino, toastis la gubernistino kaj ĝojis Sanĉo Panza: Ĉar heredo iom defrotas aŭ malvarmigas en la heredonto la memoron pri la deca bedaŭro postlasita de la mortanto.

Fine, alvenis la morto de Don Kihoto, post kiam li ricevis ĉiujn sakramentojn kaj abomenis per multaj kaj fortaj rezonadoj la librojn de kavaleriaĵoj. Ĉeestis lo notario, kaj diris ke li neniam legis en kavaleria libro, ke iu aventurema kavaliro estis mortinta sur sia lito tiel trankvile kaj kristane kiel Don Kihoto, kiu inter kompatoj kaj larmoj de la ĉeestantoj fordonis sian spiriton, mi volas diri: li mortis. . . . .

. . . . . Tiu ĉi estis la fino de la Sprita Junkro Don Kihoto de Manĉujo, . . . . .

*Esperanten tradukis, R. CODORNIU.*

Tipografia Moderna, á cargo de Miguel Gimeno, Avellanas, 11—Valencia.

Tiun ĉi numeron 17<sup>an</sup> de LA SUNO HISPANA, oni sendos, al la neabonantaj personoj kiuj ĝin petos kunigante 0,50 frankoj, se ni devos ĝin sendi al fremlando kaj 0,50 pesetoj se la sendo estos al Hispanlando.

Este número 17 de LA SUNO HISPANA se remitirá á las personas no abonadas que lo pidan acompañando 0,50 francos, si el envío ha de hacerse al extranjero, y 0,50 pesetas si ha de hacerse á España.



**HISPANA JARLIBRO ESPERANTISTA** enhavanta la regularon de Hispana Societo por propagando Esperanto, la protokolojn de la kunsidoj okazintaj dum la jaro 1904, la nomaron de ĉiuj hispanaj esperantistoj kaj iliajn nunajn adresojn—0,25 pesetoj kun poŝtkosto kaj 0,55 se oni dezirus ĝin ricevi pt—rekomenditan. Faru la mendojn ĉe la Administrejo de LA SUNO HISPANA aŭ al S-ro Mannel Benavente, Sociedad, 14, Murcia (Hispanujo). La membroj de H. S. p. p. E. ricevos ĝin senpage kontraŭ la sendo de ilia kotizaĵo por 1905.

**Sociedad Española para la propagación del Esperanto.**—*Presidente*, D. Ricardo Codorniu, Ingeniero, Jefe de Montes. Paseo del Malecón, C, Murcia.—*Secretario*: Reverendo P. Antonio Guinart, Escuelas Pías, Valencia.—Cuota anual: 1 peseta.—Informes al Secretario.

**EL BIBLIOTECARIO DEL GRUPO ESPERANTISTA DE MURCIA**—Sociedad, 14—Se encarga de hacer la suscripción á cualquiera revista de Esperanto, de las que se publican en la actualidad y de proporcionar cualquiera de las obras de Esperanto.

**Diccionario esperanto español de raíces, una peseta**; Gramática, 0,75; cuadro de palabras correlativas, 0,05; enumeración y significado de los afijos, 0,20; ejercicio de traducción, 0,50.—Rvdo. P. ANTONIO GUINART—ESCUELAS PÍAS—VALENCIA.

*L' Esperantiste* oficiala revuo de la Societo franca por la propagando de esperanto, 20 paĝoj (formato 15×20) da teksto franca-esperanta kun ok paĝoj de kovrilo, internacia korespondado esperanta, senpage, 3 fr. 50 por unu jaro. 4 fr. kun enskribo en la societeton. Turnu vin al *Administration de «L'Esperantiste», Louviers (Eure) France.*

**LONDONO** Pensio per gesinjoroj. Hejmaj komfortaĵoj, bano (varma kaj malvarma). Moderaj prezoj. Oni paroladas kaj korespondadas en esperanto, angla kaj franca lingvo. **Sinjorino O'Connor**, *Esperanto House, St-Stephen's Sq. Bayswater, 10.*

— MANUAL Y EJERCICIOS DE LA LENGUA INTERNACIONAL —  
**ESPERANTO**

POR INGLADA Y LÓPEZ VILLANUEVA, Precio: 3 pesetas.—En las principales librerías de España y América y en la Secretaría de H. S. p. p. E.—Escuelas Pías—Valencia.

**Rondirantoj**—Oni deziras ke seriozaj esperantistoj partoprenu en la jenaj:  
*Hispana Stelo* (Nur rondiras tra Hispanujo)—Rondestro Sro. Norman Maclean—Aguilas (provinco de Murcia).

*Katolica Stelo* (Rondiros tra Eŭropo kaj la Norda Afriko).—Rondestro. Sro. R. Codorniu —Malecón, litero C. Murcia (Hispanujo). Volu skribi al la rondestroj.

Ni translokis la Administracion de nia gazeto kaj ni petas, oni adresu la korespondadojn, abonojn kaj ĉiujn aferojn, al sinjoro Augusto Jimenez Loira, Direktoro-Administranto de «La Suno Hispana»—Godella—Valencia (España).

Hemos trasladado la Administración de nuestro periódico y rogamos que se dirija la correspondencia, abonos y todos los asuntos, al señor Augusto Jimenez Loira, Director-Administrador de «La Suno Hispana»—Godella—Valencia (España).